

ATESTO PRI SUPERA LERNADO (3-a nivelo, eksa komuna trunko)

REDAKTAĴO (minimume ducentvorta, nur uzo de PIV aŭ PV permesata)

Temis pri la verkoj:

*Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka ŠTIMEC,

*La Fotoalbumo*, unua volumo, de Trevor STEELE,

*La Kosmo kaj ni* de David GALADI-ENRIQUEZ kaj Amri WANDEL,

*Vivo de Lanti* de Ed BORSBOOM

Elektu unu el la tri jenaj temoj kaj pritraktu ĝin:

**1. La Kosmo kaj ni**

Per kiuj rimedoj la aŭtoroj sukcesas igi la astronomiajn fenomenojn sufiĉe kompreneblaj de nefakuloj?

**2. La Fotoalbumo**

Ĉu oni povas diri, ke *La Fotoalbumo* estas spegulo de Aŭstralio dum la 1960-aj jaroj?

**3. Vivo de Lanti**

Pri tiu libro, legeblas en la Lego-klubo de Kvinpetalo:

*Unue, mi malkovris nefacile alireblan personecon, nekapablecon rilati kun la homoj ĝenerale, fundamentan suferon kaj fine emocian animon.*

Kaj vi, kion vi malkovris en tiu libro?